

Friedrich Wilhelm Weber,  
Dreizehnlinden, Kapitel 1, Aus dem  
Nethegau

Friedrich Wilhelm Weber,  
Dektrilitio, ĉapitro 1, El la di-  
strikto de la Neto

Friedrich Wilhelm Weber,  
Tredecim tiliae, cantus primus

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

*tradukita de N. N. 26*

*Neto*<sup>5</sup>

1 Wonnig ist's, in Frühlingstagen  
Nach dem Wanderstab zu greifen  
Und, den Blumenstrauß am Hute,  
Gottes Garten zu durchstreifen.

1 Rave estas, en printempo  
kun migradbastono sia  
kaj floreto ĉe l' ĉapelo  
iri tra l' ĝardeno Dia.<sup>6</sup>

1. Juvat ambulare vere  
Verna prata permigrare,  
Floribus vestire comas  
Hortum Dei perlustrare.

2 Oben ziehn die weißen Wolken,  
Unten gehn die blauen Bäche,  
Schön in neuen Kleidern prangen  
Waldeshöh' und Wiesenfläche.

2 Supre iras blankaj nuboj,  
sube riveretoj klaraj,  
nove vestis sin herbejoj  
kaj altaĵoj montarbaraj.

2. Nubes altae volant alte,  
Rivi manant argentosi;  
Nova veste lactant arva,  
Saltus frudent nemorosi.

3 Auf die Bleiche bringt das Mädchen,  
Was der Winterfleiß gesponnen,  
Und dem Hain erzählt die Amsel,  
Was im Schnee sie still ersonnen.

3 Blankigejen portas ino,  
kion ŝpinis ŝi sur rado,  
enarbuste kantas merlo  
post dumvintra silentado.

3. Quod hiberna nocte nevit,  
It puella persolare,  
Merula, quod clam discebat,  
Luco gestit decantare.

4 Sind es auch die alten Töne,  
Die bekannten, längst vertrauten,  
Doch die Bleicherinnen lauschen  
Gern den süßen, lieben Lauten.

4 Kvankam estas ja malnovaj  
kantoj, longe jam konataj,  
la knabinoj aŭskultadas  
je la sonoj tre amataj;

4. Quamvis nota cantilena  
Sit cantata, decantata,  
Est puellae tamen suavis,  
Semper dulcis, semper grata.

...

...

...

<sup>5</sup>La Neto estas malgranda rivero enfluanta en la riveron Vezero, kiu fluas tra okcidenta norda Germanio en la Nordan Maron.

<sup>6</sup>aŭ eble pli konforme al la originalo kaj laŭ la traduko de Adolph Macho el la jaro 1932: vagi tra l' ĝardeno Dia. (La manuskripto troviĝas en la Esperanto-Muzeo en Vieno.)

5 Gern den süßen, lieben Lauten,  
Die in Berg und Tal erklingen;  
Hirtenbub' und Köhlerknabe  
Horchen auf um mitzusingen;

6 Mitzusingen frisch und freudig  
Nach des Winters langen Schmerzen;  
All die halbvergeßnen Lieder  
Werden wach im Menschenherzen.

7 Halbvergeßne alte Lieder  
Werden wach in meiner Seele:  
Hätt' ich nur, sie auszusingen,  
Wilde Amsel, deine Kehle! -

8 Was die Linde mir erzählte,  
Was der Eichengipfel rauschte,  
Wenn ich abends ihrer Blätter  
Heimlichen Gesprächen lauschte;

9 Was die muntern Bäche schwatzten  
Hastig im Bergunterrennen,  
Wilde Knaben, die nicht schweigen  
Und nicht ruhig sitzen können;

10 Was die Zwerge mir vertrauten,  
Die in fernen Waldrevieren  
Still in Spalten und in Klüften  
Ihren kleinen Haushalt führen;

...

5 je la sonoj tre amataj,  
super mont' kaj val' sonantaj;  
karbfaristoj kaj paŝtistoj  
ekaŭskultas kunkantantaj;

6 ekaŭskultas kunkantantaj  
post la longaj vintraj horoj;  
preskaŭ forgesitaj kantoj  
revekiĝas en la koroj.

7 Preskaŭ forgesitaj kantoj  
revekiĝas nun en mia  
menso, kanti volus ilin,  
merlo, mi per gorĝo via!

8 Tion, kion susurante  
rakontadis la tilioj,  
kiam mi la paroladojn  
subaŭskultis de l' folioj;

9 kion al mi riveretoj  
babiladis kuregantaj  
de la montoj kiel knaboj,  
resti loke ne povantaj;

10 kion en arbaroj foraj  
al mi konfidintaj estas  
nanej, kiuj en rokfendoj  
vivas kaj dumvive restas;

...

5. Semper dulcis, semper grata  
Valles personat et colles;  
Et auscultans lactus puer  
Comitatur modos molles.

6. Molles modos, quos hibernae  
Moestae noctes reticebant;  
Reviviscant cantus laeti  
Nunc in sinu, qui latebant.

7. Obsoletum modulamen  
Hoc et illud sonat vivum,  
Ut vox merulae canora  
Melos meum sit festivum.

8. Rami quercus tiliaeque,  
Quae narrabant clandestina  
Et arcana mihi verba  
Hora sacra vespertina.

9. Rivi celeri decursu  
Murmurantes, non tacentes;  
Laeti pueri sedere  
Et silere non ferentes.

10. Inter frandos sedi rerum  
Auscultator arcanarum,  
Quos in aurem crediderunt,  
Mihi numina silvarum.

...

11 Was auf mondbeglänzttem Anger Ich die Elben lispeln hörte; Was mich des ergrauten Steines Moosumgrünzte Inschrift lehrte;	11 kion lispis al mi elfoj sur herbejoj lunumitaj; kion min instruis ŝtonoj grizaj kaj de musk' kovritaj;	11. .... ..... ..... .....
12 Dies und was ich las in staub'gen Lederbänden und in alten Halberloschnen Pergamenten, Will zum Liede sich gestalten.	12 tion, krome tion, kion legis mi en disfalantaj pergamenoj kaj volumoj, formu mi al versoj kantaj.	12. .... ..... ..... .....
13 Nebelbilder steigen dämmernd Aus der Vorzeit dunklen Tagen; Wispern hör' ich ihre Stimmen, Freudenlaute, Zürnen, Klagen.	13 Bildoj el pratemp' nebula antaŭ mi nun supreniĝas; voĉoj de lament' kaj ĝojo flustre al mi ekaŭdiĝas.	13. .... ..... ..... .....
14 Männer, die vor tausend Sommern Durch den Nethegau geschritten, Heidenleute, Christenleute, Was sie lebten, was sie litten;	14 Viroj, antaŭ mil' da jaroj tra la Net-distrikt' irintaj, la paganoj, la kristanoj, homoj tie ĉi vivintaj;	14. .... ..... ..... .....
15 Eines Sachsenjünglings Kämpfe Mit dem Landesfeind, dem Franken, Und in eigener Brust die schwersten Mit den eigenen Gedanken;	15 juna Sakso, malamikon Frankan kontraŭbatalinta, kun si mem en propra brusto pli obstine luktadinta;	15. .... ..... ..... .....
16 Einer Jungfrau stilles Weinen, Einer Greisin finstres Grollen, Runensang und Racherufe, Die aus Weibermund erschollen;	16 ploro de virgin', kolero morna de maljunulino, runokantoj, venĝovokoj el la buŝo de virino;	16. .... ..... ..... .....
...	...	...

17 Frommer Mönche weises Walten Im Konvent zu Dreizehnlinden, Sanft bemüht durch Lieb' und Lehre Trotz und Wahn zu überwinden;	17 laborado de monaĥoj en Konvent' Dektritilia, klopodantaj ame venki spiton per agado pia;	17, ..... ..... ..... .....
18 Ihr Hymnen, gottesfrohe, Die bei Tag und Nacht erklangen, Die den Sieg des Christenkreuzes Jubelnd in die Berge sangen;	18 ĝojaj himnoj de ĉi tiuj, tage, nokte sonadintaj, venkon de la Krista kruco en la montojn jubilintaj;	18. .... ..... ..... .....
19 Und darein des Waldes Rauschen Und dazu der Brandung Stöhnen: Alles will zu einem Liede Dumpf und hell zusammentönen.	19 susurado de l' arbaro, surĝemado eĉ aldone: ĉio ĉi en unu kanton volas nun kuniĝi sone.	19. .... ..... ..... .....
20 Sei's, und sei es euch gesungen, Die ihr wohnt an Ems und Lippe, Ruhr und Diemel, Neth' und Emmer: Alle seid ihr edler Sippe;	20 Estu ĝi por vi kantata, homoj el la oriento, nordo, sud' aŭ okcidento: Estas vi de nobla gento.	20. .... ..... ..... .....
21 Alle sprecht ihr eine Sprache, Frommer Mutter biedre Söhne, Ob sie rauh im Waldgebirge, Weich in Sand und Heid' ertöne.	21 Havas vi ja unu lingvon, ĉu malmolan en montaro, aŭ ĉu mola tiu estas, se vi loĝas ĉe la maro.	21. .... ..... ..... .....
22 Kinder ihr der Sachsengaue, Nehmt das Beste, was ich habe: Gern gereicht, ist unverächtlich Auch des kleinern Mannes Gabe.	22 Vi infanoj de Saksujo, prenu mian etan donon: same kiel ne despektu oni la malmultan monon.	22. .... ..... ..... .....
...	...	...

23 Denkt, ich böt' euch Heideblumen, Eine Handvoll, die ich pflückte, Als mit herbstlich gelben Laube Sich bereits der Osning schmückte.	23 Pensu, ke por vi mi plukis belajn florojn en kamparo, kiam jam aŭtune flave sin ornamis la montaro.	23. .... ..... ..... .....
24 Rügt es nicht, wenn ich den Helden In der Heimat Farben male; Dünkt er manchmal euch ein Träumer, Nun, er war ja ein Westfale:	24 Se mi pentris la heroon tro hejmlande, tiam sciu, ke li estis ja Vestfalo, kaj revulo estas tiu:	24. .... ..... ..... .....
25 Zäh, doch bildsam, herb, doch ehrlich, Ganz wie ihr und euresgleichen, Ganz vom Eisen eurer Berge, Ganz vom Holze eurer Eichen.	25 Malcedema, tamen milda kaj honesta li ja estas, kiel fer' kaj kverkoj viaj, kiuj ĉiam firmaj restas.	25. .... ..... ..... .....
26 Heut noch ist bei euch wie nirgend Väterbrauch und Art zu finden; Darum sei es euch gesungen, Dieses Lied von Dreizehnlinden.	26 Ĝis hodiaŭ konserviĝis la prapatra moro via; tial por vi tiu kanto de l' Konvent' Dektritilia!	26. .... ..... ..... .....
27 Doch ein Uhu murrst dawider: „Rauh sind deines Sanges Töne, Und der Netheborn, der dunkle, Deucht mir kein Hippokrene.	27 Sed mokulo grumble plendas: „Ne edifas la rakonto, kaj la fonto de la Neto ja ne estas muza fonto.	27. .... ..... ..... .....
28 Laß das Leiern, laß das Klimpern! O es schafft dir wenig Holdes; Beßres Klingen, bestes Klingen Scheint das Klingen mir des Goldes.	28 Lasu la gurdadon tedan, enuigas lir-sonoro; pli agrable al mi ŝajnas la sonoro de la oro.	28. .... ..... ..... .....
...	...	...

29 Und die eigne Haut zu pflegen, Ist vor allem mir das erste; Bau im Garten deine Rüben, Bau im Felde deine Gerste!	29 Por si mem nur zorgu ĉiu, flegu li nur haŭton sian; vi kulturu viajn rapojn kaj surkampe grenon vian!	29. .... ..... ..... .....
30 Laß die schimmligen Scharteken Unterm Kessel rasch verrauchten: Kohlen sind's, die wir bedürfen, Dämpfe sind es, die wir brauchen! <sup>7</sup>	30 Lasu vi la volumaĉojn forfumiĝi sub kaldrono: nur de karbo, fer', maŝinoj estas ja al ni bezono.	30. .... ..... ..... .....
31 All den Wust papierner Träume, Grubenschätze, die vermodern, Daß sie endlich nützlich werden, Unterm Kessel laß sie lodern!	31 La amasoj putriĝantaj de la sonĝoj surpaperaj, ke utilu ili fine, flamu sub kaldronoj feraĵ!	31. .... ..... ..... .....
32 Nur das Einmaleins soll gelten, Hebel, Walze, Rad und Hammer; Alles andre, öder Plunder, Flackre in der Feuerkammer.	32 Rad', levilo kaj martelo, gravas la matematiko; malvaloras ja alio, nur validu la tekniko!	32. .... ..... ..... .....
33 Mag es flackern, mag es flammen, Daß die Wasser sprühn und zischen Und der Welt zerrissne Stämme Hastig durcheinander mischen;	33 Flagru, fajro, flamu arde, ke la akvoj vaporiĝu, kaj la gentoj de la mondo haste inter si miksiĝu.	33. .... ..... ..... .....
34 Denn das große Ziel der großen Zukunft ist die Einerleiheit, Schrankenloseste Bewegung Ist die wahre Völkerfreiheit.	34 Ĉar la celo de l' estonto estas ja la unueco; senbarila moviĝado estas vera libereco.	34. .... ..... ..... .....
...	...	...

<sup>7</sup>En la originalo tekstas tiu linio: Dämpfe sind's, die wir gebrauchen!

35 Laß da Klimpern, laß das Leiern,  
Wer erfreut sich solchen Schalles?  
Beßres Klingen, bestes Klingen  
Ist das Klingen des Metalles.“ -

36 Gelber Neidhart, alter Uhu,  
Wohl versteh' ich deine Meinung:  
Bist du doch der seelenfrohen  
Gotterlösten Welt Verneinung!

37 O du möchtest sie im Mörser  
Erst zerstäuben und zerreiben,  
Um in Tiegel und Retorte  
Dann den Geist ihr auszutreiben!

38 O du würfst sie in die Arme  
Gern dem Moloch unsrer Tage,  
Daß sie ganz in Rauch zergehe  
Nach Sibyllenwort und Sage!

39 Alte Uhu, gelber Neidhart,  
Mag's dich ärgern und verdrießen:  
Dennoch grünt ein reicher Garten,  
Wo der Menschheit Rosen sprießen.

...

<sup>8</sup>aŭ eble ankaŭ:

Mi komprenas ja, mokulo,  
tiun vian opinion;  
ĉar kontraŭas vi la savon  
de la mondo, neas Dion!

<sup>9</sup>aŭ:

vi ja estas de la mondo  
Di-savita kontraŭulo

35 Lasu do la lir-gurdadon!  
Kiun tio ĉi ĝojigas?  
La sonoro de l' metalo  
multe pli ja plezurigas.“ -

36 Mi komprenas vin, mokulo,  
olda, morna enviulo;  
vi ja estas de la bela  
Dia mondo kontraŭulo!<sup>89</sup>

37 Volas vi ĝin en pistujo  
disfrotadi kaj polvigi,  
en krisolo kaj retorto  
poste ĝin senspiritigi!

38 Ĵetus vi ĝin en la faŭkon  
de l' moloko ja volonte,  
ke neniu homo konu  
ĉi belajon plu estonte!

39 Vi mokulo morna, malgraŭ  
viaj moko kaj ĉagreno  
tamen belaj rozoj floras  
en la homa florigardeno.

...

35. ....  
.....  
.....  
.....

36. ....  
.....  
.....  
.....

37. ....  
.....  
.....  
.....

38. ....  
.....  
.....  
.....

39. ....  
.....  
.....  
.....

...

40 Dennoch blüht die weiße Lilie,  
Und im Grottenheiligtume,  
In des Waldes fernstem Tale  
Träumt die stille blaue Blume.

41 Dennoch klingt es aus den Lüften,  
Aus des Haines Dämmerungen,  
Und die Amsel hat ihr letztes  
Lied noch lange nicht gesungen;

42 Und die Nachtigall im Busen,  
Sie wird jubeln, sie wird klagen  
Jeden Lenz, solange auf Erden  
Rosen glühen und Herzen schlagen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* FRIEDRICH WILHELM WEBER (*Frederiko Vilhelmo Vebero, \*1813-12-25 – †1894-04.05*).

*Arg-114-227 (2014-04-18 18:36:23)*

40 Tamen floras sorĉlilio;  
en sankteja groto ia,  
en arbara valo fora,  
sonĝas ja la flor' magia.

41 Tamen sonas el krepuska  
arbareto, el aero,  
kaj la merlo ne jam kantis  
lastan kanton sur la Tero.

42 Kaj la najtingalo kantos  
plende en la primavero,  
jubilante, dum ankoraŭ  
batas koroj sur la Tero.

*Traduko de la Germana poemo “Dreizehnlinden, Kapitel 1, Aus dem Nethegau” de* FRIEDRICH WILHELM WEBER (*Frederiko Vilhelmo Vebero, \*1813-12-25 – †1894-04.05*) *en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO (*Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04*).

*Arg-114-228 (2014-04-18 18:28:14)*

40. ....  
.....  
.....  
.....

41. ....  
.....  
.....  
.....

42. ....  
.....  
.....  
.....

*Traduko de la Germana poemo “Dreizehnlinden, Kapitel 1, Aus dem Nethegau” de* FRIEDRICH WILHELM WEBER (*Frederiko Vilhelmo Vebero, \*1813-12-25 – †1894-04.05*) *en la Latinan de* N. N. 26 *en* 1890 ?.

*Arg-114-1169 (2012-04-02 22:23:10)*